

VENEZUELA STELO

Organo de Venezuela Esperanto-Asocio, 35-a jaro / N. 83/1-a semestro 2009



Foto el la pluraj prelegoj de Liba Gabalda en Esperantujo pri Venezuelo

Enhavo

Kiuj ankoraŭ kontraŭstaras al la lingva diverseco, Esteban E. Mosonyi, pp.1-2a.

Ne Submetiĝu, Mario Benedetti, tradukis Andrés Turrisi, p.3a.

Nia Vojaĝado en Venezuelo, Liba Gabalda, pp.4-5a.

Mi edziĝos al Sofio, Ricardo Coutinho, p.5a.

La Insulo de Nemo (IV), Johano Negrete, pp. 6-8a.

Antiakuzativa Reago, Félix García, p.8a.

Naciaj kaj Internaciaj Novaĵoj, p.9a.

25-a Printempa Semajno Internacia. St. Andreasberg, Liba Gabalda, p.10a.

Komunikaĵo pri Gaza, Venezuela Esperanto -Asocio, p.11a.

IV-a Sabla Printempo, Liba Gabalda, p. 12a.

Ĉu Karakas, Karako aŭ Karakaso?, Johano Negrete, pp.13-15a.

Rakonto pri la Maro (Karinja Rakonto), María Guadalupe Rodríguez, tradukita de Jorge Mosonyi, pp.15-16a.

KIUJ ANKORAŬ KONTRAŬSTARAS AL LA LINGVA DIVERSECO?

Esteban E. Mosonyi

Antaŭnelonge mi prirakontis la mondiskalan danĝeron eble produktantan la iompostioman malaperon de la plimulto de la proksimume 6000 lingvoj hodiaŭ parolataj de la homaro (Ven. Stelo, No. 82). Tiu situacio certe daŭradas, sed ankaŭ estas evidente ke jam ekis multaj formoj kaj mekanismoj de memdefendo en la koncernaj parolantaj komunumoj, kaj fare de intelektuloj, specialistoj, kune kun aliaj sociaj agantoj, inkluzive simpatiantojn de lingvaj kaj kulturaj malplimultoj. La rezistemo de minacataj lingvoj fariĝas ĉiutage pli observebla, kaj kvankam ĝisnune ne povis haltigi, eĉ malpli renversi la lingvomortigan tendencon, jam estas klare videbla la ebleco fortikigi la vivkapablon de granda kvanto da etaj lingvoj kaj socioj.

Hodiaŭ la grandaj internaciaj organizoj –UNO kaj UNESCO inter aliaj- senhezite apogas la universalan diversecon je naturaj kaj socikulturaj estaĵoj, valoroj kaj ecoj, pri kio jam ekzistas multnombraj deklaroj kaj dokumentoj. Rilate al lingvoj, ĉiu perparola simbolsistemo konsistigas grandsignifan homaran kulturheredaĵon. Cetere, la lingvodiverseco ne estas obstaklo por perfekta universala komunikado. Internacia helplingvo estos ĉiam ebla kaj necesa, sekve Esperanto prezentiĝas kiel bonega kandidato. Esperanto ĝuas protekton de internacia kunsento; ĝi estas ankaŭ kulturheredaĵo de la homaro pro la samaj kialoj jam menciitaj, kiel lingva sistemo kaj kiel kultura, porkultura kaj interkultura perilo, unika en sia speco.

Sendube la progresema plimulto de la tutmonda publika opinio partoprenas je tiuj ideoj, eĉ eldiras sian solidarecon. Sed ne mankas esceptoj. Inter ili aperas reakciaj, forte konservemaj intelektuloj, kiuj repuŝas iun ajn antaŭeniron direkte al plurkulturismo,

VENEZUELA STELO

Apartado postal 47675, Caracas 1041-A
telefonnumero 58-0212.662.9224
www.esperanto-venezuela.org
venesperanto@cantv.net

Redakcia Komisiono: Jorge Mosonyi,
Esteban Mosonyi, Johano Negrete kaj
Nancy Aquino.

Estraranoj:

Prezidanto: Jorge Mosonyi
Vic-Prezidanto: Johano Negrete
Ĝenerala Sekretario: Juan Miranda
Kasistino: Blanca Elizabeth Garzón

Voĉanoj:

Esteban Mosonyi (Interinstituciaj Rilatoj)
Nancy Aquino (Eldonado)
Ricardo Coutinho (Biblioteko kaj Revuo)

Enlandaj Delegitoj:

Alfredo Ovalles (Maracay)
Germán Montero (Maracaibo)
Jesús Cedeño (Maturín kaj Ciudad Bolívar)
Alfredo Portillo (Mérida).

Eksterlanda Delegito:

Andrés Turrisi (Italio)

Pri la enhavo de niaj artikoloj repondeblas iliaj aŭtoroj.

Manke de indiko de la aŭtoro, respondeblas la redakcio.

Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton.

Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj kritikoj. Tio ebligus al ni la plibonigadon de la revuo, pri kio ni antaŭdankas la kunlaborantojn.

al mondskala homaranismo, al kunvivado de etskalaj kaj grandskalaj socioj jure kaj etike egalvaloraj. Inter ili mi volas mencii unu konatan pensulon, la hispanan filozofon kaj verkiston Fernando Savater, nur kiel elstaran ekzemplon de tiun kritikendan sintenon. Li estas prototipo de iu supraĵa, “bestselereca” filozofio tre populara en nemalmultaj medioj, reprezentiva de dekadenca globalisma ideologio, forte markita far ekonomia neoliberalismo senspirita. Do, Savater komencas neante sian eŭskan apartenon, malplivalorigante la antikvan lingvon kaj longan kulturtradicion de tiu emblema popolo. Krome li ankaŭ preteratentas sian nediskuteble katalunan familinomon. Koncerne la mondan lingvan situacion li tutsimple opinias ke la lingvoj kiel tiaj ne valoras, absolute ne gravas. Li reduktas ilin al la kondiĉo de nurnuraj iloj por transigi ideojn kaj mesaĝojn. Savater eĉ intencas revivigi la biblian miton de la Babelturo, kvazaŭ nomante malbeno la historian multecon kaj variecon de niaj lingvoj, kio fakte riĉigas la homaran kulturhistorian heredaĵon. Sed tiu pensulo neadas kontraŭ ĉiu evidenteco, en unu el siaj ĵusaj artikoloj, la ekziston de gravaj konoj kaj pensmanieroj amasigitaj de la homaro dum jarmiloj, malkaŝante per tio sian egan malscion, eĉ en sia propra laborspaco. Li asertas malklerule, ke nur grandaj unuopaj intelektuloj kaj studemuloj povas eligi gravajn ideojn, forgesante ke ankaŭ ili dependas de ilia lingvosistema bazo, kaj precipe, ke ne ekzistas kontraŭdiroj inter individuaj kaj kolektivaj scioj. Ĉiu lingvo estas trezoro, neniam balasto. Savater atakas ankaŭ Esperanton, malgraŭ ke li agnoskas ĝian raciecon kaj logikan konstruitecon, ĉar li laŭdogme disdegnas ĉiun ajn solvoproporon por tuthomara interkomunikado. Ĉiukaze li nur aljuĝas parte tiun kapablon al la angla lingvo, ne al la ŝekspira, sed al la “bizneseca” de la usona neoliberala kapitalismo, la sama kiu estigis la egan nuntempan mondkrizon. Fine, mi deziras klarigi, ke mi ne sentas iun ajn malsimpation aŭ malamikecon kontraŭ Savater, kiun mi persone ne konas. Tamen lia pensmaniero taŭgas por ekzempli la nuntempajn postrestantajn kontraŭstarojn al la lingva kaj kultura diverseco, al aŭtenta internacilingvo, kaj konkrete al Esperanto.

Ne submetiĝu

Mario Benedetti

Esperantigis: Andrés Turrisi

Ne submetiĝu, ankoraŭ estas tempo
sukcesi kaj estigi re-iradon,
akcepti la fantomojn,
la timojn enterigi,
elĵeti la balaston,
ripeti la flugadon.
Ne submetiĝu, vivo estas tio:
daŭrigi la vojaĝon,
postkuri viajn revojn,
malligi tempofluon,
forigi la skoriojn,
malfermi la ĉielon.

Ne submetiĝu, ne cedu mi petegas,
eĉ se malvarmo rostas,
eĉ se la timo mordas,
kvankam la sun' sin kaŝas
kaj kvankam vent' silentas,
plu brulas via animo,
plu vivas viaj revoj.

Ĉar vivo estas via
kaj ankaŭ la deziro,
ĉar tion volis vi
kaj ĉar vin amas mi.
Ĉar daŭre ekzistas vino
kaj amo, tio certas.

Ĉar vundoj ne ekzistas
kiujn tempo ne sanigas.
La pordojn plenaperti,
forigi la riglilojn,
forlasi la muregojn
kiuj ŝirmadis vin.

La vivon vivi, akcepti la defion
retrovi la ridadon,
ekzerci sin por kanti,
neglekti gardon kaj etendi manojn,
disfaldi la flugilojn
kaj reklopodi plu,
jubili pro la viv' kaj veni al novaj flugoj.

Ne submetiĝu, ne cedu mi petegas,
eĉ se malvarmo rostas,
eĉ se la timo mordas,
kvankam la sun' subiras
kaj la vent' silentas,
plu brulas via animo,
plu vivas viaj revoj.

Ĉar ĉiu tago estas re-komenco.
Ĉar estas ĝi la hor' kaj plej taŭga
moment'.

Ĉar solulin' ne statas vi.
Pro tio ke vin amas mi.

NOTO: Mario Benedetti, eseisto, poeto kaj verkisto. (Urugvajo, 1920). Li mortis antaŭ malmultaj tagoj, la 17-an de majo 2009. La poemo ĉi tie prezentita en esperanta versio taŭgas kiel malgranda omaĝo al tiu elstara aŭtoro, kies verkaro estas sintezo de la plej superaj kaj noblaj homaj valoroj.

NIA VOJAĜADO EN VENEZUELO

Liba Gabalda

Venezuelo situas en la norda parto de la Sudamerika kontinento. Ĝi estas lando de gigantaj dimensioj. Tie vi trovas la plej grandan lagon en Sud-Ameriko, la trian plej longan riveron, la plej altan akvofalon kaj telferon en la mondo. La pejzaĝo de Venezuelo apartenas al tiuj plej eksterordinaraj, kiujn vi povas vidi: okcidente elstaras neĝkovritaj pintoj de la Andoj, sude troviĝas humidaj praarbaroj, oriente etendiĝas belega plataĵo “Gran Sabana” kun eksterordinaraj tablomontoj. Ĉe la Kariba maro etendiĝas strandoj. La ĝangalo estas riĉa je flaŭro kaj faŭno. En Venezuelo estas 43 naciaj parkoj, 20 naturaj monumentoj kaj tri mil kilometroj da plaĝoj. Ĉiu regiono havas sian ĉarmon kaj ofertas al la vizitanto mirindan spektaklon de natura beleco kaj eksterordinarajn travivaĵojn.

Krom sia natura beleco Venezuelo estas konata ankaŭ pro la plej belaj virinoj de la mondo. Multfoje ili gajnis la konkurson de beleco “Miss Universo”. La ĉefa riĉeco de Venezuelo estas en ekspluatado de nafto, mineraloj, ercoj kaj aliaj produktoj.

Somere 2008 ni vizitis Venezuelon. Ni restadis tie dum 6 semajnoj. Floreal (mia edzo) venis tien por parte labori pri projekto por la metroo de Karakaso. Mi akompanis lin kaj kune ni libertempis. Dum la okdekaj jaroj de la pasinta jarcento ni loĝis en la ĉefurbo Karakaso, dum 6 jaroj, do ni sufiĉe bone konas tiun-ĉi ekzotikan landon. Tamen ni povis rimarki ŝanĝojn post dudek du jaroj. La unua afero kiun mi rimarkis tuj post la alveno estis plidensigita trafiko kaj multaj novaj malpli grandaj aŭtomobiloj ol antaŭe. La loĝantaro de Karakaso plimultiĝis de 4 milionoj al preskaŭ

6 milionoj. Pro rapida kreskado de la loĝantaro kreskis ankaŭ malsekureco kaj krimo. Konsilindas ne eliradi nokte kaj eviti danĝerajn kvartalojn. En malgrandaj vilaĝoj oni vivas trankvile kaj kontente.

Nuntempe oni multe konstruas kaj plibeligas la domojn farbante ilin. Ankaŭ la muroj estas farbitaj kaj pentritaj. La plejparto de la personoj kun kiuj ni havis eblecon paroli estas kontentaj pri la nuna registaro kaj ĉefe pri la prezidento *Hugo Chávez*. Li favoras malriĉulojn kaj gejunulojn ĉar li bone scias ke en ili estas la estonteco de la lando. Li gajnas simpatian de la popolo sciante paroli ilian lingvon.

La nutraĵoj estas iom kostaj. Kio daŭre malpli kostas estas la benzino. Plenigante la benzinujon de la aŭto vi pagas malpli ol aĉetante glason da freŝa fruktosuko. Pliboniĝis la lerneja sistemo kaj oni strebas je alfabetigado de la homoj. Kio ne ŝanĝiĝis estas la daŭre ekzistantaj domaĉoj sur la ĉirkaŭaj montetoj de Karakaso kaj aliloke. Ne belas rubaĵoj ĉie en la urboj, strandoj kaj ĉe vojoj. En metrostacioj kaj en luksaj magazenoj regas pureco. La homoj estas afablaj, komunikemaj, parolemaj kaj helpemaj. Junuloj kaj infanoj gajas.





Sekvo de la paĝo 4a

Dum nia restado ni vizitis konatajn lokojn en Karakaso, strandojn kaj ekkonis novajn belajn partojn de la lando. En *Puerto Ordaz* ni havis bonŝancon spekti ekspozicion pri orkideoj, admiri la imponan riveregon *Orinoko*, viziti la akvofalojn “La Llovizna” kaj “Cachamay” ĉe la rivero *Caroni*. En la ŝtato *Monagas* ni vizitis la groton “Guacharo” kaj proksime al la urbo *El Tigre* la rokaron “Farallones de Chimire”. En la ĉe-mara vilaĝo *Todasana* ni vizitis la “Muzeon de La Vero”. En *Cuyagua* ni ĉeestis vilaĝan feston: spektaklon de dancantaj diabloj antaŭ la preĝejo, promenadon de sanktaj figuroj, tamburadon, dancadon kaj amuziĝon ĝis la frumateno.

En la sidejo de Venezuela Esperanto-Asocio ni renkontis malnovajn geamikojn kaj konatiĝis kun novaj, entuziasmaj esperantistoj. Tra la lando troviĝas kelkaj izolitaj esperantistoj, kiuj plejparte lernis per interretaj E-kursoj. Pluraj el ili planas partopreni la UK-on en Kubo post du jaroj. Espereble ilia deziro plenumiĝos kaj ni revidos ilin denove.



Mi edziĝos al Sofio

Ricardo Coutinho

Iufoje en eta vilaĝo de la insulo Madejro, Portugalio, dum la unuaj jaroj de la 20^a jarcento loĝis Sofio; ŝi estis bela junulineto.

Sur la strato parolis Marko al ŝi.

Marko: Saluton, Sofio! tre bele estas hodiaŭ.

Sofio: Saluton, Marko. Dankon, sed... ĉiutage vi diras la samon.

Marko: Jes, tamen hodiaŭ estas speciale...

Sofio: Ne ĉagrenu! Vi scias ke miaj gepatroj ne ŝatas ke vi enamigu min...

Marko: Do..., ĉu vi ne kredas ke mi estas bona por vi?

Sofio: Ne tiel bona... ĉar miaj gepatroj...

Marko: Atentu! Mi faros ke morgaŭ viaj gepatroj ŝanĝu sian opinion.

Sofio: Sed... foriru! Ĉiama stultulo! Laboru!

Marko: Morgaŭ vi vidos, mia kara fraŭlino!

(kaj li foriris)

Kiam ankoraŭ ne aperis la suno, Marko foriris el sia hejmo. Ne por labori en la kamparo, li havis alian aferon en la menso. Li iris ĉe la domon de Sofio kaj atendante vidi iun ajn kunloĝanton li senvestiĝis.

Jam estas tempo! (Marko pensis)

Kaj kun nur la subvesto, li fiere ekmarŝis al sia hejmo ŝajnigante ke li estis elirinta el la fenestro de Sofio. Kompreneble la klaĉo kuris kiel fajro tra la tuta vilaĝo. Sofio suferis la honton ĉe siaj gepatroj kaj senvole ŝi edziniĝis al la fripono Marko. Kaj dum kelka tempo la fripono devis pacigi la ĉagrenon de sia karulino, sed finfine li konkeris ŝin per tia fia strategio.

LA INSULO DE NEMO (IV)

Johano Negrete

La amo pura kaj fidela la mondon faras bona, bela. Tiel diris kaj kredis la poeto Julio Baghi. Ĉu tio veras? Eble tio povus esti vera, kiam oni pensas pri amidealo, kaj teorie ĝi veras multe pli ol en la ĉiutaga praktikado de la rilato inter du homoj. Almenaŭ tiu, kiu disvolvas la potencon de la amo certe kreskas, pliboniĝas kaj plibonigas la vivon de tiuj homoj, kiuj rilatiĝas kun la amanta persono. Ties forto estas kiel lumradio, kiu supozeble plenumas efikan bonfarton sur la animo de la ĉirkaŭantoj. Tiusence jes ja, la amo faras la mondon bela, kondiĉe ke la amanto celos iun amidealon.

Kaj kvankam la homo estas multe pli feliĉa per la amo, kiun donas ol per la amo, kiun ricevas, la pasio enhavas iun dialektikan ludon, kiu determinas la interŝanĝon de roloj inter amanto kaj amato kiel tute nepra parto de la vivteatro, ĉar amo ne havas vojon nek precizan vizaĝon; ĝi tamen sentigas la premon kaj tempon de ĉiuj okazoj kaj cirkonstancoj de rekontiĝoj, de agado, kaj de ili ĉiuj ĝi ĉerpas la materialojn por produkti tian magian kunfandiĝon de animoj pere de zigzagaj padoj kaj neserĉitaj okazaĵoj. Neniu el ĝiaj trajtoj distingiĝas pli ol tiu de senkonscio, la vera “signo” de amo kiel ordono aŭ leĝo de la naturo.

Dudek kvar jaroj pasis, kiam Nemo revenis al la insulo de sia naskiĝo. Li jam aĝis kvardek unu kaj bezonis reveni, ĉar lia vivo ne havis plu sencon sen reakiri la tempon kaj lokojn de sia infaneco. Lia animo lastatempe estis preskaŭ mortanta pro nostalgio kaj revo je sia lando.

Iutage, promenante tra lia kara urbo, Nemo ĉirkaŭiris la straton de la tiamamata Njeves, anhelante revidi ties domon. La strato estis pli mallarĝa ol li unue supozis, sed tie li spektis longe la saman domon de antaŭe, la samajn fenestretojn, kie iam li sopiris emocie vidi aperi tiun karan kapeton de la knabino; la saman fenestreton al kiu li ĵetis iun mesaĝon skribe, aŭ signalis per poŝtuko aŭ fajfo, kaj samtempe timante, ke ŝiaj severaj gepatroj sciu iom pri lia enamiĝo. Kia emocio kaj kiom da sentoj alvenis nun al lia koro el tiu sola strato kaj domo!

Guste staris li kiel antaŭe dum unu horo ĉe la angulo de la strato revivigante momentojn de tiu

unua enamiĝo. Sammatene li aŭdis de konatulo, ke Njeves instruas ĉe liceo de proksima urbo kaj ke ankoraŭ ŝi fraŭlinas en siaj kvardek tri jaroj! Aldonis la konatulo ion pli mirindan, nome, ke ŝi instruas pri pli malpli simila fako de Nemo! Efektive, ŝi diplomiĝis pri filologio kaj li pri lingvistiko. Ĉu koincido de iliaj ĝemelaj animoj dudekkvar jarojn antaŭe? Kiu scias?

Do, Nemo tuj antaŭvidis emocie la eblan scenon de renkontiĝo kun ŝi kiel surprizon en la laborejo de ŝia liceo. Sekve, apud la telefonlibro li serĉis la numeron de ŝia familia domo por konfirmi la veron de tiuj strangaj novaĵoj. Kiam Nemo prenis la aparaton kaj pretis telefoni lia emocio pligrandiĝis, la spiro intensiĝis, la parolo mutiĝis, dubante li flankenlasis la aparaton, kaj sekve ĝin reprenis plidecide, signalis la numerojn, kunigis ĉiun kuraĝon kaj aŭskultis dolĉan voĉon.

— Hola?

—Hola, ĉu la domo de familio Olana?

—Jes, sinjoro. Kiu parolas?

Certe, li ne povis identigi la voĉon de Njeves post tiom da jaroj, sed la nuna dolĉa voĉo, kiu faris Nemon tremeti, estis sendube de maljuna virino. Estis familianino, ŝia avino. Tiam li estis sciigata, ke la adoleska amatino, kaj la tre memorata virino de liaj junaj jaroj, bedaŭrinde, jam ne loĝas en la insulo. Ŝi translokiĝis. Tion informis la maljuna virino afable kaj fiere pri sia nepino. En tiu lasta jaro, la memoratino jam ne laboris ĉe la liceo, sed postenis en pli bona pozicio, kiel direktorino de bonfama biblioteko en la ĉefurbo de la lando. Sekve, la dolĉa maljuna sinjorino –versajne saĝa– ne povis eviti iun sintenon de indulgema laŭdo al la nepino pro tia profesia rango.

Nemo sin prezentis kiel unu el la malnovaj kunlernantoj de Njeves, deziranta saluti ŝin okaze de sia vizito al la insulo. La sinjorino daŭrigis parolante kaj plu informis lin. Venis alia surprizo. Ekde unu jaro antaŭe lia koramikino edziniĝis je unu profesoro kaj la geparo loĝas nuntempe en la ĉefurbo. Sed tamen, iu espero trovi ŝin aperis, ĉar sciigis la avino, ke la geedzoj ferias en la insulo kaj ofte Njeves telefonas al la domo.

Fine, la avino petis lian nomon por rakonti al Njeves eble baldaŭ, kiam la nova direktorino telefonos. Sed antaŭ tiu embarasa demando, Nemo ekdubis kaj prononcis ajnan nomon, ne gravas kiun, sed vere unu el la plej komunan el sia lando, tiel simplan por ke neniuj personoj povu ĝin fiksi en la memoro. La konversacio afable alvenis al la fino, kaj Nemo adiaŭis la sinjorinon.

Tiumomente, li sentis sin kiel stultuleto, ĉar ju pli li intencis alproksimiĝi sekrete al la knabino, des pli ŝi formoviĝis. Iom seniluziĝe li decidis enterigi la tutan aferon de sia infaneco, ĉar havis li la impreson, ke la knabino devus resti dum lia cetera vivo nur kiel memorata bildo, en tiu ora kaĝo de la unua enamiĝo, kun sentoj de mistero, malforto kaj feliĉo. Nenio plu! Kvankam la liceanino lernigis Nemon eltrovi la unuan romantikan sperton, ankoraŭ li devas disiĝi el ĝi, liberiĝi el tiu sensenca konduto.

Li lasis la telefonon kun tiu sento de amara dolĉeco, ĉar li trovis sensecaĵon, ke multaj jaroj poste, tiu senutila subita emocio meze de lia mallonga apero en la insulo kapricis en lia koro. Eble li intencis vane ŝanĝi la neeblecon revenigi la unuan fajron de sia adolesko, sed la Fortuno montris al li kvazaŭstultan rideton kun indulgema toleremo, precize samkiel al ĉiu ajna ulo, kiu intencas preterpasi tra la vivo ĉi-aĝe kiel romantikulo.

Same okazis kiam Nemo vizitis la mezlernejon de sia adoleska aĝo kelkajn tagojn post kiam li vane klopodis alproksimiĝi al Njeves. Li promenis tra ĝiaj salonoj, kortoj, ĝardenoj, koridoroj, ludejoj kaj klasĉambroj. Iom da konfuziĝo aperis kelkmomente ĉu la biblioteko estis antaŭe tie aŭ ĉi tie, aŭ ĉu la oficejo estis ŝanĝita aŭ ne, kaj surprizis lin la kadukeco de la malnova monaĥejo, kiu estis origine tiu konstruaĵo, antaŭ ol ĝi estis transformita en mezlernejon. Ĉio odoris je kadukeco kaj tristo en mateno nuba kaj griza. Al iu deĵoranta funkciulo li klarigis la signifon de sia vizito sub la titolo: "Al la Serĉado de la Pasinta Tempo" aŭ pli ekzakte "Al la Serĉado de la Perdita Tempo".

Ĉiukaze, vana entrepreno serĉi realon inter la ombroj de kio ni estis, kaj jam ne estas. Sed ne povis li eviti, ke multaj bildoj de instruistoj de kunlernantoj pasu tra lia menso, kaj la plej vivaj de ĝojaj virinoj kaj eĉ pliintense de Njeves apud kolono rigardante lin ekde la alta koridoro dum li tre atente moviĝas en la korto kiel vigla melegro

antaŭ sia ino. Oni ankaŭ nomas tion "paviĝi". Nu, denove Njeves alvenis al la menso kun siaj libroj kaj kajeroj sub la brako, kaj tiuj helbrunaj botetoj transsaltantaj kelkajn flakojn de la plej pluvoza kaj nuba urbo de la insulo.

Li direktis sin al apuda kirko, alia loko de multaj rememoraĵoj, kiu estis parto de la malnova deksepjarcenta monaĥejo. Ĝi estis sola kaj silenta. Li rondiris tra kelkaj altaĵoj sen granda ornamo kaj tiu ĉi etoso kunodoro de kandeloj ekscitis lian menson. «Kiom da jaroj jam pasis de kiam mi venis al la kirko kaj multfoje helpis kelkajn aranĝojn, la Betlehemon kaj la tronojn! Tridek? Tridek du? Iufoje kiam miaj kunuletoj malkovris la hostiskatolon en la sakristio ni gustumis la plezuron manĝi ilin. La pastro kompreneble ne permesis tion. Ha, tiu estas la sekreta enirejo al la turo, kiun ni konis de infaneco. Mi jam forgesis tion! Mi supreniros. Neniu ĉeestas, do mi iros.»

La du sonoriloj de la griza kaj malnova turo ankoraŭ funkcias por anonci kelkajn ceremoniojn kaj frapi la horon. Nemo alvenis al la balkono de la unua etaĝo meze de la turo kaj rigardis tuj suben la korton kun ĝardeno, kiu estis la alirola lernejo. Ĉiutage li trapasis tiun enirejon. Du altaj palmoj prezidis la ĝardenon super la ceteraj vegetaĵoj. Ŝajnis al li ke ambaŭ palmoj apenaŭ kliniĝas por reverenci lin. Ĉio estis fermita per longa krado kronita de pikoj sur la pintoj. Nemo sentis sin kiel lacega estaĵo kaj ia kapturita komencis ĝeni lin. Kio okazas? Mi sentas min subite senforta por daŭrigi ĝis la supro. Mi atendos. Mi eksidos sur la planko. Ne necese, mi kredas ke mi fartas bone. Mi povos sekvi antaŭen. Jam pasis la kapturita. Ĝi estas nenio.

Kaj tiel sentante sin bonfarta, li reprenis la turŝuparon al la supro, al la sonorilejo. Post kelkaj ŝtupoj, nun li iom tremetis kaj iu vakuo plenigis lian stomakon. La kapturita revenis. Liaj kruroj ŝanceliĝis iumomente. Li apogis sin kontraŭ la muro kaj iomete timis pri sia situacio, kaj tiel rezonis silente: «Jen mi ĉi tie, sola meze de turo kaj en urbo, kie mi jam estas fremdulo. Ho Dio, neniuj povas helpi min! Kion mi faros? Pli bone se mi atingas la sonorilejon, kaj tie mi povos resti surplanke aŭ peti helpojn se necese en la balkono. Jam mankas tre malmulte.»

Iom post iom li avancis kun granda peno ĝis li finfine atingis la lokon de la sonoriloj, ĉar de tie li povus atentigi sian malsanan situacion movigante la sonorilojn. Denove ŝajnis al li rekuperi siajn

fortojn, sed tute vane. Kiam li alproksimiĝis al la balkono por rigardi la urbon, li notis ankoraŭ ion pli strangan.

La urbostratoj aspektis kiel linioj kiuj serpentumas, kaj la korto antaŭ lia lernejo ĉepiede de la turo reduktiĝis tielmaniere, ke ĝi ŝajnis sin kaŝi sub la grundo. La sensacio de vakuo en la balkono returnis al Nemo kaj li devis firme premi la apog-reton de la balustrado por ne sveni. Subite alvenis tiu sensacio de naŭzo kaj de vomo, kiu envolvis lin en la duonkonscion dum la urbo-dimensio pligrandiĝis kiel enorma faŭko, minacanta lin engluti. Eĉ la turo moviĝas kaj Nemo jam fuŝas ĉion, kion li strebas fari, ĉar la turo mem fendiĝas kaj perdas sian formon. La konfuziĝo envolvis lin entute kaj li perdis la ekvilibron en la balustrado kaj nepre falis kun terura krio al la vakuo. Dum lia rapida flugo al la morto malligiĝis la neeltenebla angoro de la fina kolizio kaj mort-doloro, kaj kiam jam la grundo pretis preplatigi lian korpon kiel maturan tomaton li bruske suprensaltis.

—Aaaajjjj! Neeeeee! Kia angoro! Kio okazas? Dio sankta, ĉu mi vivas!? — kaj li frotadis per lia dekstra mano la ŝviton de sia frunto, dum la ĝojo esti viva inundis lian animon. —Mi sonĝis. Uf! Kia terura falo!

Tuj Nemo estis trankviligita per la zorgema voĉo de Munja, kiu ĵus vekigis apud li servopreta por atenti sian kunulon.

—Kio? Kio estis? Vi sonĝis karulo kaj vi devis havi terursonĝon, ĉar vi kriis kaj eĉ piedfrapis mian kruron.

—Jes, mi sonĝis, ke mi iris rekte al la morto falante de turo. Kia agrablaĵo esti ĉi tie, kaj kun vi! Jes, kia varmeto!

Kaj dirinte tion Nemo brakumis sian amatinon. Denove li konsciis, ke li estis reale en alia insulo, ne precize en la insulo de sia infanaĝo, sed en varma kaj korala insulo de la kariba maro, kiun li elektis por renkontiĝi kun sia amatino Munja, kiam ŝi akceptis libertempi kun li kaj decidis alveni el norda lando de Eŭropo. Efektive, lontane oni povis aŭskulti la senĉesajn sonojn de la marondoj kiel susuron de la nokto, dum densa lunlumo invadis la ĉambron kaj banis ĝin per arĝentaj radioj, kiuj briligis la liton de la geparo.

(Daŭrigota)

ANTIAKUZATIVA REAGO

Félix García Blásquez

La instruisto eksponis la lecionon kaj post ĝi, li montris libron pri la temo kaj anoncis al lernantoj la konvenon aĉeti ĝin dirante:

Instruisto - Mi rekomendas ĉi tiun libron kiu valoras nur kvin eŭrojn.

Subite, iu tre inteligenta kaj sarkasma lernanto demandis:

Petro – Instruisto, ĉu ni rajtas diri ke kvin eŭroj estas valorataj de tiu libro?

I – Ĉu vi frenezas Peĉjo? El kie vi eltiris tiun barbarismon?

P – Sed, sinjoro instruisto, la afero estas tre simpla: laŭ tio kion vi instruis al ni, frazo kun transitiva verbo povas inversiĝi, tiel ke la objekto prenos la lokon de la subjekto, kaj la subjekto iĝos agenta komplemento.....

I – Peĉjo, ĉi kaze ne temas pri transitiva verbo kaj mi memorigas vin ke laŭ la 15-a regulo de la fundamenta gramatiko akuzativo povas anstataŭi prepozicion.

P – Mi bone memoras la regulon, sed kiu estas la prepozicio kiun vi estas aludinta?

I - Tiu prepozicio estas “po”.

P – Ĉi kaze mi preferus uzi la prepozicion kaj tiamaniere oni perfektigas la lingvon eliminante ambiguecon en la uzo de la akuzativo. Laŭ la antaŭparolo de la Fundamento, Esperanto devas emi al perfektigo..

I – Vi agu kiel plaĉas al vi, sed kion mi diris estas la faktoj

NOTO: La uzo de la prepozicio “po” suferis akran polemikon, ĝis la punkto ke oni diris, ke ĝi estas “diabla prepozicio”. Plie PIV klasigas la verbon “valori” kiel transitivan.. La legantoj mem, eltiros sian propran konkludon.

Naciaj Novaĵoj

Radio Intervjuo en “Emisora 23 de Enero”

La 20an de januaro 2009, Johano Negrete kaj María Rosa Maggio, je la nomo de Venezuela Esperanto-Asocio, kaj Kooperativo Esperanto-Amikaro 15, ĉeestis kiel invititoj al la radia programo de la “Emisora 23 de Enero”, kies nomo estas “Revolución Beatle”. Tiu ĉi elsendo povis esti aŭdata en la tuta urbo Karakaso kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. La ĵurnalistino kiu kondukas la programon estas Rosa Raydan, kiu faris demandojn al la intervjuitoj. Negrete parolis pri la historio de Esperanto kaj ĝia kulturo, kaj la problemoj de internacia komunikado kiam oni uzas naciajn lingvojn. Aliflanke Maggio parolis pri sia sperto kiel lernantino kaj nun helpantino de la Esperanto-kurso en la Granda Universala Frateco en Los Teques. La programo daŭris 60 minutojn kun kelkaj muzikaj paŭzoj kaj, anekdote, kvankam Negrete alportis diskojn de la muzik-ensemblo Beatles en Esperanta versio, pro iu teknika difekto oni ne povis aŭskulti bone la kanton “Yellow Submarine”. Ĉiukaze por ni estis agrabla la intervjuo, kaj ĝi kontribuis al la disvastigo de la graveco de Esperanto en nia ĉefurbo.

Kursoj en la Lernejo de Filozofio, Centra Universitato de Venezuelo:

Dum la unua semestro de la jaro 2009, en tiu ĉi lernejo malfermiĝis baza kurso de Esperanto por ĉiuj gelernantoj de la universitato kiuj deziras lerni la lingvon. Kaj en la sama semestro malfermiĝis kurso pri la libro de Umberto Eco **Serĉado de la perfekta lingvo de la eŭropa kulturo** en la hispana lingvo; ĝi estis por lernantoj de la lernejo de Filozofio. Ambaŭ kursojn gvidas profesoro Johano Negrete.

Donaco al la Biblioteko Miguel Acosta Saignes:

Je la unuaj monatoj de 2009, Johano Negrete estis informita pri la alveno de donaco sendita de Esperanto Eldona Societo de Svedio, kiu konsistas el: **Enciklopedio pri Leksikologio**, la romano **Norda Prismo** kaj **Facilaj Tekstoj por Komencantoj**.

Internaciaj Novaĵoj

Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE):

Tiu ĉi partio jam funkcias en Francio, dum 2009 agados en Germanio, kaj ĝi deziras funkcii en la ceteraj eŭropaj landoj. Tiu ĉi politika organizaĵo intencas uzi Esperanton kiel disvantigilon de la eŭropa ideo (eŭropa identigilo), por korektigi kelkajn karakterizajn erarojn de la nuna konstruo de Eŭropa Unio, interalie la regadon de unu kulturo super la aliaj.

Tiu ĉi organizaĵo estos reprezentata de Nobela Premiito, Reinhard Selten. Selten ricevis la nobel-premion pri Ekonomiaj Sciencoj en 1994, kune kun John Nash kaj John Harsanyi. Li estas fama esperantisto kaj dum kelkaj monatoj apogis la uzadon de Esperanto inter eŭropaj organizaĵoj, en la Oficiala Akcepto en la Parlamento okaze de la Tago de Eŭropo.

La aktivado de partio kiu uzas la flagon de Esperanto jam estis kritikata fare de multaj partianoj de la lingvo. Ili konsideras ke esperantismo estas tre diversa movado, kaj ke ĉiu intima rilato de la lingvo kun iu ajn partio povus riski la imagon de esperanto entute.

Fonto: Tonyo en

http://www.soitu.es/participacion/2009/04/u/tonyo_1239730518.html

25-a PRINTEMPA SEMAJNO INTERNACIA St. Andreasberg 10-17.4.2009

Liba Gabalda

Jam la kvinan fojon PSI okazis en la montara urbeto St. Andreasberg, en la internacia klerigejo Haus Sonnenberg. Al la jubilea evento aliĝis rekorda nombro da partoprenantoj - 186. Ni festis Paskon. Ĉar la Pasko estas religia festo, por kredantoj okazis ĉiutage matena Laŭdo kaj aliaj koncernaj ceremonioj. Dum la tuta semajno akompanis nin bela, sunoplena vetero.

Por bonvenigi la partoprenantojn, antaŭ la enkonduka vespero, estis ofertita ŝaŭmvino. Lars Sözüer konatigis nin pri la semajna programo. Ĝi estis riĉa je prelegoj, diskutoj, seminarioj. Okazis E-kursoj, gimnastiko, tabloteniso, kvizo, dancado kaj por la infanoj multaj interesaj ludoj en kiuj ili fervore partoprenis. La ĝejnuloj havis sian propran programon.

Sabate vespere, antaŭ la Pasko, oni kolektiĝis ekstere apud granda pasko-fajro kaj kantis en akompano de gitaro. Dimanĉe matene komenciĝis por la malgrandaj infanoj ovo-serĉado. Du grandaj leporoj akompanis ilin en la arbaro, kie estis "kaŝitaj" ĉokoladaj ovo kaj aliaj bongustaĵoj. Trovitaĵojn ili metis en mempreparitajn paperajn korbetojn kaj plenajn verŝis en la korbon de la leporoj. Poste ĉio estis egalparte dispartigita inter ili. La plej etaj ĝuis Mazi-filmon kaj laŭ ĝi ili ludis diversajn rolojn, kio tre entuziasmigis ilin. Krom tio ĉiuj vespere ili povis aŭskulti piĝamajn rakontojn. Infanoj ankaŭ partoprenis en manlaboroj.

En vikipedia trejnado oni provis enretigi mallongan tekston. Dum la gazetara seminario estis klarigita kiel redakti leteron por inviti ĵurnaliston al iu Esperanto-evento kaj kiamaniere fari aŭ elekti interesan foton. Harald Schicke raportis pri sia vizito al Norda Koreio, Bert Schumann pri familia vojaĝo tra Japanio antaŭ la UK en Jokohamo. Ambaŭ estis tre interesaj. Al la Kuba kongreso, kiu okazos en Havano venontjare invitis kaj pri sia lando rakontis Juan Besada.

De fakulo pri arbaroj ni eksciis pri Harz-montaro. Pri la Suno interese prelegis Bernard-Régis Larue, pri germanaj rapidtraĵoj ICE rakontis Andreas Diemel. Pri la Eŭropa kongreso informis Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar. Okazis ankaŭ internaciaj ekzamenoj. En la vilaĝo Scharzfeld, apud Herzberg-La Esperanto urbo estis inaŭgurita E-ŝildo pri partneraj urboj inter la germana Herzberg kaj la pola Góra.

Ĉiu posttagmeze eblis ekskursi aŭ promeni en apuda arbaro. Kelkaj tie serĉis kaŝitan trezoron. Ŝatata estis vizito de la bela urbo Stolberg. En Herzberg estis akcepto ĉe la urbestro. Ni vizitis unikornulan kavernon en ties proksimeco.

Vesperaj programeroj estis dediĉitaj al la kulturo. Ni spektis prezenton de Emily Barlaston, kiu tre sprite amuzigis ĉeestantaron. Christoph Frank prezentis puĉteatraĵon Herbe por granda admiro de la plej malgrandaj infanoj. Je invito de Helmut Klünder jam la trian fojon dum PSI venis piankoncerti Frank Muschale akompanata de siaj du kunludantoj. Ili prezentis muzikstilon de "Boogie-Woogie". Ni ĉiuj estis ravitaj. Ĝi estis donaco de la "Elizabeth-Klünder-fondaĵo" por la 25-a PSI. Dum la jubilea balo oni dancis cirklodancojn kaj poste la ĝejnuloj regis la diskotekon. En la Internacia Vespero prezentiĝis PSI-orkestro kaj pluraj talentaj muzikŝatantoj, inter kiuj junaj infanoj, Ni aŭskultis pianon, fluton, gitaron, akordionon. Jam tradicia fariĝis la Fantomludo. Ĉi-foje oni malkaŝis Danka Leyk.

Ĉiuj vespere ni agrable babilis en Trinkejo kiun estris Helmut Klünder. Rememore pri la jubileo ni ricevis glason kun skribo: 25a jubilea PSI. Laŭdon kaj dankon al la organiza teamo!

Pri la evento interesiĝis ĵurnalistoj kaj aperis pluraj artikoloj pri ni en lokaj gazetoj.

Venontjare PSI okazos samloke de la 2-a ĝis la 9-a de aprilo 2010.

VENEZUELA ESPERANTO-ASOCIO

KOMUNIKAĴO

La Venezuela Esperanto-Asocio, kultura movado dediĉita al la progresigo de la internacia lingvo Esperanto, kiel ilo por la paco kaj kompreniĝo inter la popoloj de la mondo, kun absoluta respekto al iliaj historiaj tradicioj kaj kulturaj valoroj, deziras esprimi sian protestan voĉon, forpuŝon kaj indignon antaŭ la genocidaj agoj faritaj de la ŝtato kaj la armeo de Izraelo kontraŭ la palestina popolo de la Gaza teritorio, kiuj okazigis teruran resulton de pli ol mil mortintoj kaj kvin mil vunditoj, la plejmulto el ili senkulpa civila loĝantaro kun alta procento da infanoj kaj virinoj. Estas pluraj la kialoj, kiuj atribuas al la izraela invado ekstreman gravecon:

1. Rekta defio al la aŭtoritato de la Unuighintaj Nacioj, kies rezolucioj estas arogante malestimataj de Izraelo, ĉiam kun la apogo de Usono.
2. Ignorado de la internacia humanisma juro, esprimita per rektaj agresoj al organizaĵoj kiaj la Ruĝa Kruco, Unicef kaj diversaj pacaj movadoj.
3. Intenca detruado de lernejoj, hospitaloj, provizaj centroj de nutraĵoj kaj medicinoj, kaj ŝarĝoj de humana helpo.
4. Krima brutalado kontraŭ la civila popolamaso, kio estigas bildon de vera ŝtata terorismo.
5. Senmezura venĝo-politiko, kiu atingas centfojan nivelon da mortigoj kaj materialaj ruinigoj kompare al tiuj ricevitaj de la palestinoj.
6. Severa limigo al sendependa gazetistara alirol, kiu estis anstataŭita per informaj servoj submetitaj al la izraela ŝtato.
7. Plena ignorado de la aŭtoritato de Hamas, naciolisma organizaĵo kiu venkis en balotado per granda plimulto, sed kiu estas konsiderita de Izraelo kiel terorisma grupo.
8. Amasutiligado de militarmiloj malpermesitaj pro ĝiaj ruinigaj efektoj, kiel ekzemple bomboj de blanka fosforo, grapolbomboj, reduktita


urano kaj eksperimentaj eksplodiloj, kies efektoj estis pristudataj kvazaŭ laboratorie en la Gaza teritorio.

9. Perversa kaj humiliga blokado subtenita jam de jaro kaj duono kontraŭ la Gaza teritorio per aero, maro kaj tero, kun fermado de alirvojoj kaj malpermeso je cirkulado de varoj kaj homoj, kaj - kiel aldonajo al ĉio- konstruo de giganta apartiga muro, vera monumento al ekskludado kaj maltoleremo.

Ĉio antaŭa konsistigas danteskan bildon de militkrimoj, kiuj devos esti ekzemplodone punitaj por iam atingi daŭran pacon kaj universalan rekonon de la palestina popolo kiel libera kaj sendependa ŝtato; kaj por tiamaniere ebligi la moralan kaj etikan restarigon de Izraelo antaŭ la okuloj de la homaro.

Oficiala Komunikaĵo
Redaktita de Jorge Mosonyi
Esperantigita de Johano Negrete

Por
krei
mondon
Oni
ne
povas
esti
Indiferenta
al milito



IV-a SABLA PRINTEMPO

Liba Gabalda

Ekde la 3-a ĝis la 5-a de aprilo 2009 okazis en Ĉeĥio, en la urbo Písek la IV-a Sabla Printempo - kleriga seminario kun ĉeftemo Esperanto kaj Interreto. Partoprenis ĝin 33 gesamideanoj el Ĉeĥio, Slovakio, Belgio, Germanio, Francio. Lastjare la evento estis subvenciita de la urbo Písek kaj ĉi-jare oni ankaŭ esperas tion.

Vendrede vespere Pavla Dvořáková prezentis la ĵus aperintan esperantlingvan version de la retpaĝaro de la urbo Písek (vidu www.icpisek.cz – viaj reagoj ĉe icpisek@esperanto.cz estas bonvenaj, ĉar montros al la urbestro, ke Esperanto vere vivas!).

Diversaj lektoroj poste skize parolis pri la programo de la evento. Petr Baláž kaj Marek Blahuš klarigis pri E@I (www.ikso.net). Ĝi estas organizo kiu okupiĝas pri projektoj rilataj al edukado kaj interreto. Oni parolis pri Esperanta Klavaro por Vindozo kaj programo Ek!, pri uzado de Skype, pri elektronikaj libroj kaj precipe fama e-Librejo de Franko Luin, savita en Ipernity en la paĝo de ĉino Zhang Xuesong (Kabano Deodaro) kaj enkonduke pri ciferecigo de E-dokumentoj.

Sabate matene kaj posttagmeze oni laboris en tri malsamaj grupoj. La unua grupo temis pri videofilmoj. Unue oni klarigis funkciadon de videokamero, pri diversaj transiroj, filmomuntado, montris mallongan filmeton pri slovaka kastelo "Trenčiansky hrad" kaj lernis labori kun la programo Windows Movie Maker. Alia grupo surbendigis diversajn tekstojn kaj kantojn. La tria grupo okupiĝis pri skanado kaj korektado de tekstoj kaj pri plibonigo de fotoj.

Vespere oni projekciis E-videofilmojn kaj ni ĉiuj kantis je akompano de gitaroj. En tiu muzika vespero gvidis nin Pavla Dvořáková kaj Vladimír Tůrk.

Dimanĉe ĉiuj grupoj prezentis resumon de sia laboro. Ĉiuj tri grupoj laboris efike kaj kun entuziasmo. Oni multe lernis kaj spertiĝis. Petr Chrdle invitis partoprenantojn al diversaj E-aranĝoj kaj parolis pri nova Muzeo de Esperanto en Svitavy (Orienta Bohemio), kie okazis renkonto antaŭ unu semajno pro la inaŭguro de la nova ekspozicio. Marek Blahuš prezentis novan kompaktdiskon por varbado al Esperanto en pluraj lingvoj. Ni vidis parton de preskaŭ unuhora prezento trafte kaj interese farita. Sekvis vigla diskuto. Ideoj ne mankas kaj la ambicioj estas grandaj, sed por tio oni bezonas kaj serĉas kunlaborantojn.

Fine ni dankis al la organizantoj, la geedzoj Dvořák kaj kun espero ke tiuj-ĉi fruktodonaj kaj valoraj seminarioj daŭrigos venontan jaron ni adiaŭis.

Pli da informoj vi trovas ĉe:
<http://eo.wikipedia.org/wiki/Písek>



¿ĈU KARAKAS, KARAKO AŬ KARAKASO?

Johano Negrete

Ŝajnas, ke ne ekzistis problemoj kun la nomo de *Karakaso* en la lingvo internacia Esperanto, almenaŭ ĝis la jaro 1987, tio estas, ĝis unu jarcento post la naskiĝo de la lingvo internacia. Tamen, danke al la venezuelaj esperantistoj, ĉar ne povus esti alia la kialo de tiu ĵusa vario, la nomo de nia urbo estis metata en unu menuo de preferencoj laŭ la bontrovo de lingvouzantoj.

En la plej populara vortaro **Lexicon Sopena**. *Diccionario de bolsillo Esperanto-Español y Español-Esperanto*. Eldonejo Ramón Sopena S. A., Barcelona, España, 1967, 1980 de ĉiu lernanto de esperanto disde la hispana lingvo, kiu enhavas liston de patronomaj kaj geografiaj nomoj, oni lernas senprobleme kun tuta klareco, ke la nomo de la ĉefurbo de Venezuelo estas *Karakaso*. Ankaŭ en la granda modela vortaro de la lingvo —nur esperante— kiel estas PIV **Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto**, Represo de la dua eldono; Sennacieca Asocio Tutmonda; Parizo, 1981. de 1981 la nomo es *Karakas/o* = ĉefurbo de Venezuelo (66° 55' W, 10° 29' N), kaj ankoraŭ en la posta eldono de PIV kun Suplemento **Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto kun Suplemento**; Sennacieca Asocio Tutmonda; Parizo, 1987. de 1987 aperas ekzakte same la nomo de nia ĉefurbo. Tiu ĉi lasta estas gvida vortaro de la lingvo kaj ludas saman rolon de referenco ol en la angla lingvo la vortaroj *American Heritage* kaj la *Oxford Dictionary* aŭ la *Duden* en la germana lingvo aŭ la *Diccionario de la Real Academia Española* en la hispana. Tiel do ĝis 1987 ne estas indico, ke ni devas elekti la ĉefurban nomon inter diversaj terminoj, kaj la nura malsama referenco, kiun mi trovis estas en geografia libro aŭ *Atlaso Poŝatlaso de la Mondo*, Kartografie, n.p., Praha, 1971. de 1971, kie aperas la kruda vorto *Karako* kiel nomo de la urbo.

Kion oni ne komprenas bone estas kial ekde 1987 aŭ 1971 la nomo de la ĉefurbo komplikiĝas en esperanto, sen ke la esperantistaro el Venezuelo havis iun rilaton kun tia afero. Aŭ ĉu vere okazis, ke ili havas ian rilaton?

En 1992 mi komencis lerni aŭtodidakte la lingvon internacian per mia **Lexicon** enmane dum mia restado en Hispanio. Kompreneble, Caracas

laŭ tiu lernilo estas “*Karakaso*”.

Ĝis tiam ĉio estis klara. Sed iom da tempo poste revenante al Karakaso en 1993 mi kontaktis la Venezuelan Esperanto-Asocion (VEA) kaj povis scii, ke ties estraranoj preferis uzi ‘*Karakas*’, ĉar la nomo *Karakaso* “sonas malbone”. Krome, ankoraŭ ili uzas ‘*Karakas*’ en bulnetoj kaj informiloj. Certe, ‘*Karakas*’ ne estas esperanta kaj aliflanke ĝi ne respektas la originalan nomon de Caracas. Eble ĝi estas *hermafrodita* vorto inter la esperanta kaj la hispana.

Tamen al mi ĉio ĉi tio ŝajnis tre stranga, ĉar tiu preferenco abrupte rompita la logikajn regulojn pri asimilado de geografiaj nomoj en la esperanta lingvo. Tiele ‘*Karakas*’ ne sekvis la regulojn, tiel kiel Bogoto, Limo, Bonaero, Madrido, Londono, Parizo, Novjorko, Berlino, Moskvo, Romo, Pekino, ktp., kie la regulo estas aldoni finaĵon “o”.

Kiaj kialoj por ne diri *Karakaso*? Ha, tiu ĉi vorto malbone sonas. Ĉu ĝi malbone sonas? Jes, ĝi havas malbelajn nuancojn rilatajn kun ‘*tumulto*’, ‘*rabo*’, ‘*ribelo*’. La hispanaj vortoj estas samorde ‘*bochinche*’, ‘*saqueo*’, kaj ‘*sublevación*’. Ili rilatas al la epizodo de tritaga popola ribelo en la jaro 1989 okanzinta ne nur en Karakaso, sed en pluraj urbetoj, kiel reago al la tiama registara intenco imponi ekonomikan neoliberalan pakadon postulitan de FMI (Internacia Mona Fondaĵo). La civila kaj spontanea ribelo estis brute subpremita de militistoj kun perdo de nekalkuleblaj civilaj homoj, kaj pravigita “por savi demokracion”. En la lando la netaŭga nomo uzata por tio estas “*caracazo*” /*karakaso*/. kiuj rilatas al la dato 27-an de februaro de 1989. Tiu ĉi klarigo estas pruda aŭ tre politika —kaj kolegoj pardonu min pro sincero— ĉar la esperanta nomo de *Karakaso* ne estas direktita al la venezuelaj parolantoj, sed altiuj de aliaj lingvoj kaj kulturoj, kiuj nescias pri tiuj venezuelaj eventoj aŭ pri la nomo uzata ĉi tie. Pro tio, ‘*Karakaso*’ havas neniun alian resonon por la esperantistaro de la tuta mondo ol la de simpla urbonomo. Tio estas tiom simile vera kiel la vorto *kulo* (hispane samsona *culo* = postaĵo), kiu ne signifas alian aĵon esperante ol la ĝenan insekton, kaj *tetaso*

(hispane samsona *tetazo* = frapo per mammo) nur signifas esperante “*tazo por teo*” aŭ “*da teo*”, kaj nenion pli. Pro tio mi kredas, ke la pravigo de kelkaj el miaj kolegoj estas pruda aŭ politike influita, pro la fakto, ke la nuancoj de ‘*Karakaso*’ dependus de la laŭdo aŭ kondamno pri tiu historia evento. Efektive, sub tio, ke *Karakaso* aludas al “tumulto”, kaŝiĝas ideologia interpretado de “malbonintenco” bonfaro, ĉar membroj de VEA, kiel ĉiuj lingvouzantoj, ne estas liberaj blovi ideologiajn babelojn per kutimaj vortoj. Male laŭ aliaj *Karakaso* povus signifi ion pozitivan, historie kaj politike revolucion, kiel ekzemple, la “unuano ribelon en la mondo kontraŭ FMI”, laŭ nia Luis Brito García. Ribelo inda por popolo, kiu jam posedas tiun spiriton en la enhavo de ĝia himno “Gloria al Bravo Pueblo” (Gloron Popol’ Brava!). Ĉi-kaze la universo-diskurso de miaj venezuelaj kolegoj ankaŭ povus havi iun fonon de politika konservativismo.

Alifoj oni sugestis min uzi la alternativan nomon *Karako* —fine aperas la finaĵon “o”— anstataŭ *Karakas*, per kiu reliefigas la litero “k”—kiel en *Ku Klux Klan*— Sed la vorto *Karako* estas estetike sinmortigo kompare kun “Caracas”, pli bona vorto. Ankaŭ *Karako* ne enhavas la ritmon kaj vokalan mildecon de *Karakaso*, kaj finfine ĉar *Karako* tiom similas al “carajo” /karaŝo/ *Carajo* /Karaŝo/: hispane punloko en la alteco de velŝipoj dum pirata epoko. La esprimo por puni mariston estis “foriru al carajol”, kaj poste kutima esprimo de malaprobo kaj malindigo en la hispana kulturo., tiu puna loko kaj vere nune tiom malbona esprimo en la hispana, ke, mi certas, venezuelaj esperantistoj ne ŝatus aŭdi tiun esperante esprimon: “foriru al Karako!”.

Kompreneble miaj venezuelaj esperantistoj povas argumenti kontraŭ mi, ke *Karako* ne estas vorto por venezuela uzado, sed por ĉiuj esperantistoj, kaj pro tio ĝi ne rilatas al la hispana ‘carajo’. Bone, ili pravas. Kaj do ili samtempe pravigas min pri la taŭga ‘*Karakaso*’. Tamen se oni situas sin nur en la universo de la esperanta lingvo aŭ kulturo kaj nur en tio, ekzistas aliaj kialoj por diri ke ‘*Karako*’ malbelsonas, ĉar ĝi havas aereton de nigra korvo pro simileco esperante kun ‘*korako*’, speco de korvo simila al la korniko, kaj ‘*korako*’ signifas aldone komerca mezepoka ŝipo simila al

la *karavelo*. Eble pro ĉio ĉi alilanda esperantisto povus rilatigi nian ĉefurbon kun nigraj korvoj kaj karavelaj ŝipoj.

Konsekvence, pro tiu pruda sinteno de niaj esperantistoj, unufoje en la modela esperanta vortarego PIV, laŭ ĝia lasta eldono kun suplemento, tio estas, la Nova PIV **Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto** (NPV), Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris, 2002 de 2002, aperas komplikaj. Nun la nomo de nia ĉefurbo havas du radikojn por elekti laŭ nia bontrovo: 1) *Karak/o* kaj 2) *Karakas/o* En neniuj kazo ‘*Karakas*’ estus korekta, kvankam ĝi estas uzita de iuj membroj de VEA. La **Akademio de Esperanto** ĉiam respektis la nomojn, kiujn nativoj de iu ajn lando adoptis pri iliaj geografiaj lokoj, kondiĉe, ke oni plenumu la lingvajn regulojn, kaj ĉiam la institucio establis kiel bonan vorton *Karakas/o*. Tiel okazis kun ‘*Hindio*’ kiam esperantistoj el tiu ĉi lando preferis pro historiaj kialoj ŝanĝi la vorton unue al *Bahrato*, kaj poste al *Barato* por esperatigi eĉ pli la nomon.

Do, oni ne havas alian vojon ol allasi la konkludon, ke tia konfuzaĵo pri la nomo de nia ĉefurbo dum la lastaj jaroj estas interesa lingvokontribuaĵo de la venezuelaj esperantistoj, ĉar sendube ĝi devenas de neniam eksterlanda institucia altrudo. UEA ankaŭ kutimis uzi la vorton *Karakaso*, kiel mi povis konstati en pluraj ekzempleroj de la revuo **Esperanto**, kiam ĉio estis pli klara. Kaj precize tiu ĉi kontribuaĵo de niaj esperantistoj estas ŝuldata multe pli al ilia semantika afekto ol al la fideleco je lingvaj reguloj kaj bona stilo. La vorto *Karakaso*, kiun nun ili ne ŝatas, ne nur eksterordinare belsonas, sed krome faras juston al la bravaj indiĝenoj de la etno, de kie devenas la vorto *Caracas*.

Ke por ĉiam venezuelaj esperantistoj uzu tion, kio devas esti uzita, la originalan nomon de *Karakaso*, kiu beligas la ĉefurbon, ĉiuloke verdan, almetita al ĝia nacia parko *El Avila*. Ĝi estas urbo en verda valo de eniata klimato, kiu povas kreski kaj povas esti, se ankoraŭ kaosa, morgaŭ splenda kun sia loĝantaro multetna, multracia, laborema kaj tolera sub la klamo de reganta verdaĵo, kiu karesas la okulojn.

RAKONTO PRI LA MARO

Karinja rakonto

Esperantigis: Jorge C. Mosonyi

Iu maljunuleto estis, onidire, la posedanto de la maro. Li portadis la maron en iu granda ĵaro. Eta nepo akompanis lin ĉiam, kvazaŭ li estus lia fileto. Dum la maljunulo portadis la maron en la ĵaro, li serĉadis lokon por ĝin elverŝi. Kiam li sentis sin lacega, li metis la ĵaron surteren.

-Atendu min ĉi tie- li diris al sia nepo, - sed ne rigardu enen. Mi serĉos lokon por elverŝi ĝin.

Li foriris, kaj pli malfrue, ĉirkaŭ tagmezo, li revenis el sia rondiro tre laca, pendigis sian hamakon, kaj kuŝiĝis por ripozi. Tiam li diris:

-Mi trovis neniun lokon, mia filo. Kien mi iros por malpleniĝi ĉi tion?- Kaj li ree foriris.

-Aŭskultu min bone, ne enklinu vin por rigardi en la ĵaron-, diris la avo kiam ajn li lasis la knabeton sola.

-Zorgon-, diris li iufoje.- Kion mi diris al vi, infano? Tio estas la maro. Se vi enfalas, vi mortos.

Tiumaniere parolis la avo al sia nepo; sed tiu ĉi, same kiel ĉiuj infanoj, ne atentis la konsilon. Denove la maljunulo pendigis sian hamakon kaj kuŝiĝis por ripozi.

Je alia okazo ree foriris la maljunulo, kaj lasis sian nepon zorganta pri la ĵarego. Tiam la nepo faligis ĝin. Bonŝance la avo troviĝis proksime kaj alvenis ĝustatempe por rekolekti la maron. Diris la maljunulo:

-Kial vi ne obeas min, ĉu vi volas ke mi batu vin?

Rakonto pri la maro sekvas en la paĝo 16a

Sekvo de la paĝo 14a

Notoj: La sekvantaj klarigoj apartenas de la artikolo de Johano Negrete "Ĉu Karakas, Karako aŭ Karakaso?"

1.-**Lexicon Sopena.** *Diccionario de bolsillo Esperanto-Español y Español-Esperanto.* Eldonejo Ramón Sopena S. A., Barcelona, España, 1967, 1980

2.-**Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto,** Represo de la dua eldono; Sennacieca Asocio Tutmonda; Parizo, 1981.

3.-**Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto kun Suplemento;** Sennacieca Asocio Tutmonda; Parizo, 1987.

4.-*Poŝatlaso de la Mondo,* Kartografie, n.p., Praha, 1971.

5.-La hispanaj vortoj estas samorde 'bochinche', 'saqueo', kaj 'sublevación'. Ili rilatas al la episodio de tritaga popola ribelo en la jaro 1989 okanzinta ne nur en Karakaso, sed en pluraj urbetoj, kiel reago al la tiama registara intenco imponi ekonomikan neoliberalan pakajon postulitan de FMI (Internacia Mona Fondaĵo). La civila kaj spontanea ribelo estis brute subpremita de militistoj kun perdo de nekalkuleblaj civilaj homoj, kaj pravigita "por savi demokracion". En la lando la netaŭga nomo uzata por tio estas "caracazo" /karakaso/.

6.-*Carajo* /Karaño/: hispane punloko en la alteco de velŝipoj dum pirata epoko. La esprimo por puni mariston estis "foriru al *carajo*!", kaj poste kutima esprimo de malaprobo kaj malindigo en la hispana kulturo.

7.-**Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto** (NPV), Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris, 2002

Sekvo de la paĝo 15a

Kaj li finkolektis la maron.

Tiumaniere, kiam ajn laciĝis la maljunuleto, li lasis la ĵaron por povi serĉi senŝarĝe la lokon por ĝin elverŝi. Iutage la knabeto enmetiĝis preskaŭ tutkorpe en la ĵaron, kun la intenco tuŝi per la piedo la fundon de la akvo. Iom poste alvenis la avo kaj trovis lin preskaŭ paralizita pro la malvarma maro. Se li estus restinta tie iomete plu, tiu knabeto estus certe mortinta pro malvarmo. Bonŝance la avo savis lian vivon elprenante lin de tie.

Post tio foriris denove la maljunuleto.

-Restu ĉi tie- li diris. -Iru nenien. Se mi ne trovos vin tie ĉi, mi certe batos vin.

Vidante ke la avo estis foririnta, la knabeto serĉis iun sekan branĉeton kun forko, ligis ŝnureton al ĝi, kaj enmetis ĝin en la ĵaron.

-Ĉumpuru, Ĉumpuru-, kirliĝis la sardinoj. Li prenis kelkajn el ili. Li faris fajrujon, rostis la fiŝetojn kaj manĝis ilin. Poste alvenis la avo tre laca; tuj li kuŝiĝis surventre por ripozi, kaj rigardadis. Subite li vidis kelkajn formikojn kiuj portis ostojn de sardinetoj. Ili ronĝadis la ostetojn.

-Venu ĉi tien- diris la maljunuleto, -kiu prenis tiujn sardinetojn?

-Mi ne scias, avo- diris la knabeto, -kiu povis preni ilin?

-Kiu do!- respondis la avo-, -la formikoj mem diras ke estis vi. Rigardu kiel ili portas la ostetojn.

La maljunuleto koleriĝis, kaptis sian nepon kaj vipis lin plurfoje pro tio ke li elprenis tiujn fiŝetojn el la ĵaro, ĉar ili estis garditaj por la maro, kiam oni trovos lokon por ĝi.

Post tio iris malproksimen tiu maljunuleto serĉante ankoraŭfoje la lokon por la maro. Finfine li trovis ĝin, kaj elverŝis la akvon de la ĵarego. En tiu loko, onidire, staras arbo kun forko, kies nomo estas “akva arbo”. Tie mem troviĝas la ĵarego, kie oni ĝin metis, en la forko de la arbo, en tiu loko nomita “ruĝa maro”.

Tiel finiĝas tiu ĉi rakonto.

Noto: La *Rakonto pri la maro* estas literatura kreitaĵo de la karinja (kariña) indiana popolo de Venezuelo. Tiu ĉi etno apartenas al la kariba familio, unu el la plej disvastiĝintaj de Sudameriko. Ĝiaj komunumoj situas en la orienta regiono de Venezuelo, inter la Orinoko kaj la Kariba maro, kaj la tuta loĝantaro atingas ĝis proksimume 12000 homoj. Ili spertis rapidan kulturen ŝanĝon dum la lastaj jardekoj, kaj pli ol la duono ne bone regas sian lingvon. La *Rakonto pri la maro* estis originale rakontita de María Guadalupe Rodríguez, jam mortinta loĝantino de la komunumo Mamo, situanta en la ŝtato Anzoátegui (“Ansoátegi”). Oni preparas dulingvan ilustritan eldonon (karinja-hispana) por tiu ĉi jaro.

Ĉiu kontribuaĵo estas
bonvena por nia revuo.